

ESPERANTO-MANIFESTO 2012

1.

Koncepto kaj aplikado de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto estas konkretiĝo de la homaraj pens- kaj ago-manieroj pri transkultureco kaj de transdisciplineco.

Transkultureco signifas kulturon de integremo.

Transdisciplineco komprenatas laŭ la Charto pri Transdisciplineco kun la centraj kriterioj de dialogo, diskuto,

rigoro en argumentado, malfermiteco al la nekonata kaj toleremo pri la alia.

La prefikso trans- substrekas la pontigan funkcion de Esperanto kiel komunikilo, ebliganta la vojon al sendependa kulturo de unueco en diverseco.

2.

Portaj pilieroj de Esperanto (kaj de ties Movado) estas la samaj kiel tiuj de la Unuijintaj Nacioj: **paco, homaj rajtoj kaj daŭropoveco**.

La Rio+20-Konferenco de la UN en la jaro 2012 denove konstatis, ke daŭropoveco ne estas opcio de la homaro, sed neceso por ĉiuj.

Tio pro la simplaj neforigeblaj faktoj,

ke nia Tero estas limigita planedo kaj ke la homo estas (nur) parto de ĉio viva.

Komunikado estas signife resursokonsuma aktiveco de la homo

kaj pro tio submetatas al la devigoj de daŭropoveco.

Fakte la t.n. **interna ideo** de "frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj"

jam entenis la principojn de paco kaj de la homaj rajtoj,

la principo de daŭropoveco nun fariĝis natura-logika plivastiĝo de la interna ideo.

3.

Ĉi imanenta daŭropoveco de Esperanto prezentiĝas en la tri formoj kuniga lingveco, demokratia dulingveco kaj ekologia konformeco.

Kuniga lingveco rilatas al la fakto, ke la koncepto de "unu lingvo por ĉiuj"

signifas universalan vivoformon kiel superan identecon, kiu pro si mem liberigas de denaskaj lingvorutinoj kaj respektas ĉiujn gepatrajn lingvojn kaj kulturojn, tiele kreanta unikan rezervujon de spertoj-scioj pri universale vivata transkultureco.

Demokratia dulingveco signifas realigon pri egaleco kaj justeco

per nepermeso de komunikada avantaĝigo al aina etna lingvo,

tiele el si mem kreanta la fundamenton de ideala parol- kaj dialog-situacio

kaj de minimumigo de sociaj riskoj en interkomunikado-interkompreniĝado.

Tio estas grava paŝo al sendependiĝo

for de geopolitika, ekonomia kaj lingve-kulture malegaliga kaj nedemokratia premo de unu mondvasta etna lingvo kiel ekz. la Angla.

Ekologia konformeco rilatas al la evito de resursodisipado kaj de toksado al la medio

pere de grava redukto de la nombro de tradukdirektoj en la praktika intera laboro,

tiele el si mem kreanta eblon realigi ĉikampe universalan medioprotektadon.

4.

Ekstera ideo de organizita kaj organizanta Esperanto-Movado

devas kongrui kun la pluevoluita interna ideo.

La **RST-formulo** (reciprokeca, simetria, travidebla) estas nur parto de ĉi intenco.

Per konsekvenca integrado de la koncepto pri daŭropoveco

Esperanto kiel lingva parto de ekologie taŭga internacia kaj transkultura komunikado

fariĝu viva-vigla modelo de **soci-ekologie funkcia universalismo**.